WIKIPEDIA

# Havaja lingvo

La **havaja lingvo**, propranome **ʻŌlelo Hawaiʻi**, estas aŭstronezia lingvo parolata sur la Pacifika insularo Havajo. Ĝi estas la lingvo de la praaj havajaj indiĝenoj. Ĝi estas unu el la du oficialaj lingvoj de la usona ŝtato de Havajo, kaj la alia estas la angla lingvo. La havaja estas grava parto de la havajaj kulturo, muziko, kaj tiel plu, sed nur la loĝantoj de la privata insulo Niʻihau uzas la havajan lingvon ĉiutage.

ISO-lingvokodo :

639-1 = mankas

639-3 = **haw**

La vorto "Wiki" aŭ "Viki" en Esperanto estas havaja vorto, kiu signifas "rapida". Uzante ĝin dufoje, vi havos la vorton "wiki-wiki", kiu signifas "tre rapide".

Mapo de Havajo (Niʻihau ruĝe)

En la moderna tempo, la lingvo miksiĝis kun la angla kaj aliaj lingvoj kaj estiĝis kreolo, la havaja kreolo. Oni ne konfuzu ĝin kun la havaja.

## Enhavo


**Spiritaj Vortoj**

**Fonologio**
- Konsonantoj
- Vokaloj
- Diftongoj
- Akcento

**Gramatiko**
- Artikoloj
- Vortordo
- Verboj
- Aspektaj, Tensaj, kaj Modaj Indikiloj
- Personaj Pronomoj
- Demonstrativaj Pronomoj
- Ekvaciaj Frazoj
- Epitetaj Adjektivoj
- Predikativaj Adjektivoj
- Rekta kaj Malrekta Objektoj

**Rilataj Temoj**

**Rekomendataj Libroj**

**Referencoj**

**Eksteraj ligiloj**


## Spiritaj Vortoj

La havaja estas spirita lingvo kaj estas plene de spiritaj vortoj. Jen kelkaj ekzemploj[1]:

| vorto | signifo |
|---|---|
| **akua** | dio, diino, spirito, simile kiel japane **kami** |
| **hiwa** | dezirinda nigreco, kiel la nigrajn porkojn oni oferas al dioj |
| **kahuna** | pastro, sorĉisto, magiisto, religia ministro |
| **la'a** | sankta |
| **Nāmū** | legenda spirita popoleto, la silentuloj |
| **Nāwā** | legenda spirita popoleto, la bruuloj |
| **ʻuhane** | animo, spirito |

# Fonologio

Ĉi tie oni prezentas la fonemojn en tranĉostrekoj / / per la IFA, la Internacia Fonetika Alfabeto. La grafemojn oni prezentas en < >.

## Konsonantoj

<p k ʻ h l m n w>

/p k ʔ h l m n w/

La **ʻokina** <ʻ> estas speciala litero, kiu en Unikodo estas la deksesuma numero 02BB. Ĝi havas la sonon de la glota halto /ʔ/, ekzemple per la germana <Haupteingang> /ˈhaʊptʔaɪŋgaŋ/.

La sono[2] de <w>:

- post <i> aŭ <e> kutime sonas kiel /v/;
- post <u> aŭ <o> kutime sonas kiel /w/;
- vortkomence aŭ post <a> sonas kiel /v/ aŭ /w/.

## Vokaloj

<a ā e ē i ī o ō u ū>

/a aː e eː i iː o oː u uː/

Ekzistas mallonga kaj longa versioj de ĉiu vokalo. La realiĝo de /a/ estas [æ～a～ɐ～ə]. La realiĝo de /e/ estas [ɛ～e/i].

## Diftongoj

<ae ai ao au ei eu iu oi ou>

/ae aj ao aw ej ew ju oj ow/

<oe> ne estas diftongo, sed sonas kiel /owe/.

### Akcento

Havaja vorto ampleksas unu aŭ pli da akcentvorteroj kun vokaloj [V], aŭ kun vokaloj [V] kaj konsonantoj [K]:

| akcentvortera formo | ekzemploj | akcenta loko |
|---|---|---|
| (K)VKV | ahi, kahi | antaŭlasta silabo |
| (K)V(K)V(V)KV | uahi, aloha, huali, kakahi, Hawai‘i | antaŭlasta silabo |
| (K)VV | ai, wai, ā, nā | sur diftongo aŭ longa vokalo |
| (K)V(K)VV | uai, uhai, kuai, wawai, iā, inā, huā | sur diftongo aŭ longa vokalo |

Lingvistoj kaj specialaj vortaroj[1] indikas la apartecojn de la akcentvorteroj ene de vorto per la punkto <.>, sed en la kutima ortografio oni ne indikas tiujn.

Oni metas glitkonsonantojn kiel /j/ kaj /w/ inter kelkaj vokaloj en vortero. Ekzemple, la vorteron <huali> oni prononcas kiel /hu'wali/; la vorteron <iā> oni prononcas kiel /i'jaː/.

Do, jen ekzemploj de kompletaj vortoj:

| vorto | prononco | signifo |
|---|---|---|
| **kana.kē‘ele.‘ele** | /'kana.'keː 'ʔele.'ʔele/ | glicirizo, nigra kando |
| **haili.moa** | /'hajli.'mowa/ | tipo de konkulo |
| **ipu.kukui** | /'ipu.ku'kuwi/ | lampo |

# Gramatiko

### Artikoloj

La vortoj **ka** kaj **ke** estas la singularaj difinaj artikoloj:

- **ke** uziĝas antaŭ substantivoj komenciĝantaj kun <a->, <e->, <o->, aŭ <k-> kaj antaŭ kelkaj substantivoj komenciĝantaj kun la **‘okina** aŭ <p->;
- **ka** uziĝas alikaze.

La vorto **nā** estas la plurala difina artikolo.

La vorto **he** estas la singulara nedifina artikolo.

La plurala indikilo **mau** uziĝas kun kaj post **he** por la plurala nedifina artikolo.

| vorto | signifo |
|---|---|
| **ka hoa.aloha** | la amiko |
| **nā hoa.aloha** | la amikoj |
| **he hoa.aloha** | (unu) amiko |
| **he mau hoa.aloha** | (kelkaj) amikoj |

## Vortordo

La havaja frazo estas kutime VSO, verbo-subjekto-objekto.

**Ua ʻai ke kanaka i nā kowa.ū.**
*Manĝis la homo la fiŝovojn.*

La vorto **ua** markas la perfektan aspekton de la sekvanta verbo **ʻai** (*manĝi*). La vorto **i** markas la objekton.

## Verboj

La havaja verbo ne havas tenson, escepte kiam oni indikas la prezencon. Aspektojn oni markas per indikiloj kiel per **ua** en la supera ekzemplo.

## Aspektaj, Tensaj, kaj Modaj Indikiloj

| vorto | signifo |
|---|---|
| **ua** verbo | perfekta aspekto |
| **ʻaʻole i** verbo | negativa perfekta aspekto |
| **e** verbo **ana** | imperfekta aspekto |
| **ʻaʻole e** verbo **ana** | negativa imperfekta aspekto |
| **ke** verbo **nei** | prezenca tenso |
| **ʻaʻole e** verbo **nei** | negativa prezenca tenso |
| **e** verbo | imperativa modo |
| **mai** verbo | negativa imperativa modo |

**E ʻai ʻoe i nā kowa.ū.**
*Manĝu vi la fiŝovojn.*

**ʻAʻole i ʻai ʻoe i ka maiʻa.**
*Vi ne manĝis la bananon.*

**Ke hia.moe nei ʻo Pili.**
*Pili dormas.*

**ʻAʻole e hia.moe nei ʻo Pili.**
*Pili ne dormas.*

## Personaj Pronomoj

| persono | singulara | duala | plurala |
|---|---|---|---|
| 1a inkluzive | | **kā.ua** | **kā.kou** |
| 1a ekskluzive | **au, wau** | **mā.ua** | **mā.kou** |
| 2a | **ʻoe** | **ʻo.lua** | **ʻou.kou** |
| 3a | **ʻo ia** | **lā.ua** | **lā.kou** |

Ĉiuj personaj pronomoj povas uziĝi kiel subjekto aŭ objekto, escepte de **aʻu**, kiu estas la objekta kazo de **au, wau**, kaj escepte de **ia**, kiu estas la objekta kazo de **ʻo ia**.

## Demonstrativaj Pronomoj

| tipo | apud parolanto | apud alparolato | fora |
|---|---|---|---|
| **kē-** | **kē.ia** (tiu ĉi) | **kē.nā** (tiu) | **kē.lā** (tiu for) |
| **pē-** | **pē.ia, pē.nei** (tiel ĉi) | **pē.nā** (tiel) | **pē.lā** (tiel for) |
| *nul* | **ia** (tiu ĉi), **nei** (tiu ĉi, tie ĉi, nun) | **nā** (tiu, tie) | **lā, ala** (tie for), **-lā** (tiam) |

## Ekvaciaj Frazoj

Ekvaciaj frazoj estas senverbaj.

**He hoa.aloha ʻoe.**
*Vi estas amiko.*

**ʻO Keō ke keiki.**
*Keō estas la infano.*

**ʻO ia ke kahuna.**
*Li estas la sorĉisto.*

**He kahuna kē.lā.**
*Tiu for estas sorĉisto.*

**He niu kē.ia.**
*Tiu ĉi estas kokoso.*

**ʻO ia ke ali'i.**
*Li estas la ĉefo.*

La vorto **ʻo** troviĝas antaŭ subjekto triapersona.

## Epitetaj Adjektivoj

Adjektivo sekvas la substantivon.

**iʻa ʻula.ʻula**
*fiŝo ruĝa*

**ʻuku.lele liʻi.liʻi**
*ukulelo malgranda*

**He keiki aka.mai ʻo Lani.**
*Lani estas infano ruza.*

### Predikativaj Adjektivoj

La adjektivo antaŭas la subjekton.

**ʻUla.ʻula ka pua.**
*La floro estas ruĝa.*

**Liʻi.liʻi ka ʻuku.lele.**
*La ukulelo estas malgranda.*

**Hanuʻu ʻo Lani.**
*Lani estas malalta.*

### Rekta kaj Malrekta Objektoj

La markilo **i** antaŭas ambaŭ rektan kaj malrektan substantivajn objektojn en tiu ordo.

**Hāʻawi ke aliʻi i ka pua i ke kanaka.**
*Donas la ĉefo la floron al la homo.*

**Hāʻawi ke aliʻi i he ipukukui i ke kanaka.**
*Donas la ĉefo lampon al la homo.*

## Rilataj Temoj

- Polinezio
- Tahitia

## Rekomendataj Libroj


- Cleeland, Hōkūlani. *ʻŌlelo ʻŌiwi: Hawaiian Language Fundamentals*. Honolulu, Havajo, Usono: Kamehameha Publishing, 2006. angle
- Hopkins, Alberta Pualani. *Ka Lei Haʻaheo: Beginning Hawaiian*. Usono: University of Hawaiʻi Press, 1992. angle
- Kōmike Huaʻōlelo, & Hale Kuamoʻo, & ʻAha Pūnana Leo. *Māmaka Kaiao: A Modern Hawaiian Vocabulary*. Usono: University of Hawaiʻi Press, 2003. angle
- Pukui, Mary Kawena. *ʻŌlelo No ʻeau: Hawaiian Proverbs & Poetical Sayings*. Honolulu, Havajo, Usono: Bishop Museum Press, 1983. angle
- Pukui, Mary Kawena, & Elbert, Samuel H. *Hawaiian Dictionary, Revised and Enlarged Edition*. Honolulu, Havajo, Usono: University of Hawaiʻi Press, 1986. angle
- Pukui, Mary Kawena, & Elbert, Samuel H. *Hawaiian Grammar*. Usono: University of Hawaiʻi Press, 1979. angle

- Pukui, Mary Kawena, & Elbert, Samuel H., & Mookini, Esther T. *The Pocket Hawaiian Dictionary (with a Concise Hawaiian Grammar)*. Usono: University of Hawai ʻ i Press, 1980. angle

## Referencoj

1. ↑ 1,0 1,1 Pukui, Mary Kawena, & Elbert, Samuel H. *Hawaiian Dictionary, Revised and Enlarged Edition*. Honolulu, Havajo, Usono: University of Hawai ʻ i Press, 1986. angle
2. ↑ Pukui, Mary Kawena, & Elbert, Samuel H. *Hawaiian Grammar*. Usono: University of Hawai ʻ i Press, 1979. angle

## Eksteraj ligiloj

- Wehewehe, Havaja Vortaro (http://wehewehe.org/) **havaje**
- Ulukau, Havaja Librejo (http://ulukau.org/) **havaje**
- Hawaiian in Ethnologue (http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=haw) angle

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Havaja_lingvo&oldid=6471016"

**Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 22:25, 26 nov. 2018.**

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.